



elonge la floro kiun mi preferas
 La tute simpla kaj eta vinko estas.
 Printempe ekvekiĝas bluaj petaloj
 Diskrete kaŝataj de verdaj folioj.



Staŭdeto kiu kreskas kie ĝi volas
 Inter pli riĉaj floretoj elteriĝas.
 Ĉiuj petaloj bluaj kiel simboloj
 Mian ĝardeneton beligas obstine
 Kiel Esperant' en la kvin kontinentoj
 La teron homamigas trankvile.

Mireille le 12-06-00
 Trovita ĉe la reto.

Krucvortenigmo

1		2			3		4			5		6
					7							
8			9						10			
			11									
12	13								14		15	
16			17	18			19	20			21	
22			23		24		25		26		27	28
29									30			
			31									
32		33							34	35		
					36							
37							38					

Horizontale:

1. Katedrala muzikilo.
4. Dolĉa substanco.
7. Laŭta voĉa bruo (R).
8. Granda besto, eble en arkta regiono.
10. Sen forta koloro.
11. Esti riĉa, en bona stato (R).
12. Fari tion, kion alia ordonas.
14. Gesto de granda respekto (R).
16. Emfaza vorteto.
17. Dana monero (R).
19. Speco de hakilo (R).
21. Parenca per geedza rilato.
22. Vira Pronomo.
23. Buŝo de birdo (R).
25. Tre granda planto! (R).
27. Artikolo.
29. Kvazaŭ tranĉe.
30. Vera, ne fantazia (R).
31. Ne-civilizite kruela, kruda.
32. Cilindro kun interna truo.
34. 5.
36. Patriarko, kiu konstruis arkeon.
37. Juna miaŭanta besto.
38. Kapabla solvi problemon.

Vertikale:

1. Vidiloj.
2. Eble venas el la Norda Maro? (R)
3. La deka monato (R).
4. Facila, ne komplika.
5. Malgranda.
6. Ronda ruĝ-flava frukto.
9. Drogo el papavoj.
10. Malpoezio (R).
13. Koloriga metodo el Javo (R).
15. Rilata al miel-farantoj.
18. Tre, grande.
20. Esprimi voĉe (R).
22. Manĝebla verdaĵo (R).
23. Eta infano.
24. Sankta libro de islamanoj.
25. Granda frukto tropika (R).
26. Supra membro (R).
28. Rilata al parto de proza peco.
33. Ŝuego (R).
35. Apartenanta al vi.

Dank' al Marjorie Boulton.

Letero al la Redaktoro**Tre Estimata Redaktora Moŝto:**

Lastatempe mi faris grandan eŭropan vojaĝon kaj vizitis Slovenion. En tiu bela lando, tuj sude de la aŭstria alpoj, estas nur montetoj. Iu slovena viro serioze klarigis al mi, ke post kelkaj jarcentoj da pluvo kaj suno la tieaj etaj montoj fariĝos grandaj alpoj. Mi ne scias ĉu mi devus lin kredi. Ĉu vi opinias ke li blagis al mi?

Ĉiam strebante kompreni la veron,

Kon Fu Zita